
## Krucenigmo




***Horizontale***

1. geometria korp' 3. grandega ej' 5. lingna plant' 7. malgranda peco 8. metalenhava mineral' 9. dancaranĝ' 10. kunligita plektaĵ' 11. aŭstrala strut' 12.inklino por iu aŭ io 14. part' de skeleto 16. konjunkcio de komperativo 18. kurblini' 19. ronda elstaraĵo ĉirkaŭ kolono 21. sovaĝa porko 23. rimedo por pagi 24. brit' 25. voj' por trajnoj 26. dependiga konjunkcio 28. gust' de la tempo 30. grandega ŝton' 32. malgranda 33. pingloarb' 34. grasa fluidaĵ' 35. konstruaĵ' 36. distingiga vort' 37. lirika poemo 38. produkto de kokino 39. narkotigaĵ'

*Verticale*

1. drato por konduki kurenton 2. bonaspekta 3. altestimo 4. materialo por ŝuoj 5. senkolora likvaĵ' 6. besto en grego 13. monato 15. longa ŝalo de pastro dum diservo 17. brilanta farb' 20. matena humidaĵ' 22. ŝmiraĵo por la haroj 23. ŝafraso 24. grupo kun komunaj ecoj 27. melankolia poem' 29. reĝino en kartludo 31. interpunkcia signo.



*86% el miaj edzinoj ne komprenas min.*

***Solvo de la januara enigmo***

**Konontaktu nin!** **Gun.Eb@t-online.de**

**+49 3831 490003**

# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkompreniĝo**

**jaro 2006** **marto**

**La nuntempon ĝuu**
**per gaja mens',**
**sen zorg', kia l'estontec'**
**al vi estos;**
**sed prenu triston**
**eĉ per rida pens' !**
**Perfekte la fortun'**
**neniam restos.**

laŭ Horaz

Per tiuj vortoj de la fama antikva romia poeto Horaz mi deziras al ĉiuj geamikoj agrablan starton en la ĉijaran printempon kaj belajn travivaĵojn dum la renkontiĝoj en- kaj eksterlandaj. Ne forgesu ankaŭ anonci vin al la kunveno en Stralsund! Vidu www.esperantoland.org!

Gunter

## *La S.E.E-hotelo prezentas sin*

Kiel jam anoncita la esperantistoj el la en- kaj eksterlando denove havas la eblecon dum unu semajno ripozi en kaj ĉirkaŭ la Hanseurbo Stralsund. La aranĝo okazos de la 12a ĝis 16a de septembro ĉijare. Laŭ petoj de diversaj geamikoj, kiuj jam venis antaŭ du jaroj ĉi tien mi decidis denove inviti. Ĉio estas legebla sub www.esperantoland.org.

Nun mi deziras iomete prezenti nian hotelon. S.E.E. estas mallongiĝo kaj signifas *Sport* (sporto), *Erholung* (ripozo), *Entspannung* (malstreĉiĝo). Ĝi situas ĉ. 8km for de Stralsund ĉe la federacia strato n-ro 194. Proksime troviĝas sufiĉe densa arbaro kaj la Borgwall-lago. Do, oni bone povas promeni. La insulo *Rügen* oni atingas post kvarona horo per aŭtomobilo, la urbon *Greifswald* post duona horo kaj *Usedom* post naŭdek minutoj. Ankaŭ la duoninsulo *Darß* situas ĉ. 40km for.

La de familio gvidata hotelo disponas pri komfortaj ĉambroj kun televidilo, telefono kaj banejo (duŝejo). Parte ili posedas suddirektan balkonon. En la teretaĝo troviĝas vendejoj kaj restoracio, kie oni kompreneble ankaŭ ricevas bonan matenmanĝon (en la prezo).

Krom biciklaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon la hotelo mem ofertas naĝadon en propra naĝbaseno (7 x 17m). Ankaŭ la saŭno envitas al ripozo. Rekomenda dum la vesperoj estas la keglejo aŭ la boŭlejo.

La prezoj po persono kaj po nokto estas 54€ en unulita ĉambro kaj 38,50€ en dunlita. La estrino garantias gruprabaton, se estas anoncita certa kvanto da partoprenantoj. Ŝi rezervigas l0 ĉambrojn ĝis la 30a de majo. Kompreneble ankaŭ poste oni povus anonci sin, sed sen garantio.

La tempo de la 12a ĝis 16a de septembro estas la proponita dato de mi, sed oni ankaŭ povas mendi pli malmulte da noktoj aŭ plilongigi la restadon.

En la programo de la semajno estos ekskusoj al Rügen, Hiddensee, Usedom kaj al la urboj Stralsund kaj Greifswald. Kultura aranĝo en Stralsund same estas planita kiel boŭlovespero en la hotelo.

